



IMPRESSO

MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE BEL

filiand dian presadon. En majo/82, apenis la dua eldono (1.000 ekz.) ka Dum la Ĉenerala Ordinara Kunsido de BEL, okazonta en la lasta sabato de oktobro 1985 oni elektos la novan estraron por la oficperiodo 1986/1989. Mi esperas, ke du/tri monatoj antaŭ la dato de la balotado ni jam havos la nomojn de la kandidatoj al la vakontaj postenoj, por tuja diskonigo. Do, ekde nun, anstataŭ demandi al ni, ĉu jam aperis iu kandidato, preferinde demandu al vi mem, ĉu vi estas preta ak cepti iun el la jenaj postenoj: prezidanto, vicprezidanto, ĝenerala sekretario, la. sekretario, 2a. sekretario aŭ kasisto.

Miaflanke, nepras sciigi vin, ke mi tute ne volas (almenaŭ dum la kvar proksimaj jaroj) kandidatiĝi al iu ajn posteno aŭ akcepti eventualajn invitojn partopreni kiel membro de movadaj laborgrupoj. Kompense, mi promesas plu aktivi, ĝis la lasta tago de mia oficperiodo, kun la sama diligenteco, kiu karakterizis mian administradon, por ke ni sukcesu atingi pliajn celojn.

Antaŭ ol skribi ĉi tiujn vortojn, mi multe pensis, ĉu valorus la penon publike konfesi mian fruan decidon ne plu akcepti partopreni kiel estrarano de iu ajn Esperanta grupo en la proksimaj jaroj. Finfine, mi venis al konkludo, ke jes. Nur nun, post sufice granda sperto en la prezidanteco de BEL, mi komprenas kial multaj samideanoj rifuzas akcepti postenojn en niaj asocioj. Kvan kam mi jam decidis aliĝi al tiu grupo de "rifuzantoj", ŝajnas, ke mi rajtas prezenti sugestojn, por ke oni evitu almenaŭ kelkajn novajn dizertadojn de batalantoj:

- 1) Ĉiam, kiam vi aŭdos kritikojn pri la malbona funkciado de iu ajn Asocio, anstataŭ tuj kon senti kun la kritikanto, klopodu elpensi kiamaniere vi mem povus helpi la plibonigon de tiu orga nizaĵo;
- 2) Se vi ne sukcesos malkovri la manieron rekte helpi la Asocion, almenaŭ provu mildigi la kritikojn kaj atentigi la kritikanton pri la fakto, ke la estraranoj de tiaj asocioj estas volontuloj, kiuj ricevas nenion por labori, krom eventuala morala apogo kaj plezuro pro la servado.

Specialajn dankojn al ĉiuj, kiuj helpis nin dum la pasinta jaro!

Pardonpetojn pro la leteroj ankoraŭ ne responditaj!

FELICAN NOVJARON KAJ FRUKTODONAN SEMADON!

Fernando Marinho

UNIVERSALA FENOMENO

El revuo "Esperanto" (januaro/85), ni prenis ĉi tiujn pripensidajn komentojn:

"Daŭra fenomeno dum la historio de UEA estas tio, ke aliĝas al ĝi multaj novaj membroj, kiuj post nur unujara membreco malaperas. Ili ne trovis sian lokon. Ĉiu devus povi trovi tion en movado, kiu ofte uzas la devizon "Unueco en diverseco". La pli spertaj esperantistoj devas gvidi la novulojn ne nur en la lingvon, sed ankaŭ orientiĝi en la movado mem."

Ĉe BEL okazas la samo. Ĉu vi jam pripensis vian remembriĝon por la kuranta jaro? Ĉu vi instigas la novulojn aliĝi al landaj asocioj?

"TV-MANCHETE"ELSENDIS PROGRAMON PRI ESPERANTO

La 7-an de januaro/85, TV-Manchete, la dua plej spektata TV-kanalo en Brazilo, elsendis al la tuta lando, en sia ĉiutaga kultur-ĵurnalo "Manchete Panorama" (de la 19h15m ĝis la 19h40m), kvin-minutan programon pri Esperanto.

La programo estis filmita en la sidejo de BEL kaj konsistis el: intervjuo de la Prezidanto Marinho kiu transdonis ĝeneralajn informojn al la publiko pri la lingvo kaj movado; scenoj el la sabata konversacia rondo de BEL, prezentante kolektivan kantadon de "Urbo Mirinda" (Cidade Maravilhosa) kaj deklamadon de la poemo "Jozefo" (José), de Carlos Drumond de Andrade, faritan de S-ano Sylla Chaves; legado de parto de la teksto de la Brazila Nacia Himno, farita de S-ano José Rabello kaj elmontrado de libroj kaj revuoj en esperanto. La teksto de la raporto estis sobra kaj objektiva kaj la informoj korektaj.

Tiun raporton oni ŝuldas al la regula sendado de nia portugallingva informilo "Esperanto-Noticias" kiun oni faras al TV-Manchete kaj al centoj da gazetoj tra la tuta lando.

AĴOJ PRI BEL NOVAĴOJ PR

REELDONITA SUKCESINTA VORTARO - Ĵus aperis la kvara eldono (1.000 ekz.) de la vortaro Português-Esperanto-Português de Carlos Domingues, far BEL. La unua eldono aperis en januaro 78 (ankaŭ en 1.000 ekz.), danke al la klopodoj de du estraroj de la Ligo: tiu prezidita de Luiz Alberto Martins, kiu organizis kaj kompostis la tutan vortaron kaj tiu de Sylla Chaves kiu prenis sur sin la taskon financi ĝian presadon. En majo/82, aperis la dua eldono (1.000 ekz.) kaj en marto/83, la tria (1.000 ekz.). La rapida disvendado, post la dua eldono, signas sendube ne nur la progreson de la esperanto-movado, en Brazilo, lastatempe, sed ankaŭ spegulas tiu akcepto de la publiko la rekonon de la kvalitaj ecoj de la verko.

VIZITOJ, EN DECEMBRO, AL BEL - Dum la pasinta monato, vizitis nin la jenaj samideanoj: José Passini (el Juiz de Fora, MG), Lenio Marobin (Lajeado, RS), Rudolf Städele (Oberlich, Okcidenta Germanujo) kaj Sirio Silva (el Resende, RJ).

DONACOJ AL BEL, EN DECEMBRO - Alcebiades G. Lopes (RJ) Cr\$ 1.000; Ambrosio S. da Silva (RJ) Cr\$ 9.000; Antônio Rodrigues (RJ) Cr\$ 3.000; Lauro Coutinho (RJ) Cr\$ 24.337; Ivo Magalhães (RJ) Cr\$ 30.000; Paulo Rosat (RJ) Cr\$ 20.000. Al ĉiuj, koran dankon!

LIVERITAJ DIPLOMOJ, EN DECEMBRO - Baza: 57; Progresiga: 34; Supera: 05.

ELDONITAJ DOKUMENTOJ, EN DECEMBRO - Leteroj: 44; Enspeznotoj: 106; Rembursa enspeznotoj: 07 kaj Fakturoj: 07.

	BEL/MEMBRARO - Stato je la 31-a de decembro 1984						
	M-S	<u>M-1</u>	<u>M-2</u>	<u>D-M</u>	<u>B-M</u>		Entute
Gis la 30/11/84	290	146	24	33	04		497
En decembro Ĝis la 31/12/84	$\frac{10}{300}$	$\frac{01}{147}$	24	34	04		<u>12</u> 509
Ĝis la 31/12/83	288	135	23	30	02		478

KULTURKUNVENOJ EN BEL - PROGRAMO POR FEBRUARO/85

02/02 - Prelego de S-ano Alan G.Romero, kun prezentado de diapozitivoj, pri PORTUGALIO.

09/02 - KONVERSACIA RONDO (skecoj, vortludoj, raportoj, kantado ktp ...)

16/02 - Ne okazos kunveno, pro la Karnavalo.

23/02 - KONVERSACIA RONDO

* Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la 16-a horo *

LIBROSERVO DE BEL LIBROSERVO DE

Novaj titoloj disponeblaj: la prezoj, <u>de nun</u>, aperas en ORTN (brazila valorunuo), kiam temos pri eksterlandaj eldonaĵoj.

- ALMANAKO LORENZ/1985, Eld. Spirita Societo F.V.Lorenz, Rio de Janeiro, 1985, 143p. Diversaj artikoloj kiuj interesas la modernan homon laŭ la spirita vidpunkto. Cr\$ 5.000.

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

APERIS "LA MAIOJ" - Sub la aŭspicio de Klubo Esperantista Zamenhof (Caixa Postal 2012, S. Braz, 66.000-BELÉM, Pará), aperis la dua volumo de Kultura Kajero. Ĉi-foje temas pri "La Maioj", popolo kiu ekzistis en Centra Ameriko antaŭ la alveno de la hispanaj konkerintoj. La kajero estas 10-paĝa kaj kserografiita.

GRAMATIKO DE GERALDO MATTOS APERONTA - Laŭ informo publikigita en "Paraná Informilo", okt/nov/84, tre baldaŭ aperos verko de S-ano Geraldo Mattos, sub la titolo "Fundamenta Gramatiko de Esperanto".

RIĈA KULTURA PROGRAMO EN CURITIBA - Laŭ tiu sama bulteno supre citita, Paraná Esperanto-Asocio okazigas, la 2-an kaj la 4-an sabaton de ĉiu monato, ordinarajn kulturkunvenojn. Jen la interesaj titoloj de la prelegoj de oktobro kaj novembro: "Unuaj Helpoj" (Ricardo de Hollanda); "Esperanta Prononcado" (Geraldo Mattos); "Vojaĝo en Eŭropo" (Paulo Sartor de Oliveira) kaj "Logi-ko" (Geraldo Boz Jr.).

SUKCESINTA REGIONA RENKONTIĜO EN BAHIA - Sesdek personoj partoprenis la I-an Regionan Esperantan Renkontiĝon organizita de Societo Esperantista de Salvador, kun speciala apogo de Esperanta Studgrupo "Zamenhof", kaj okazinta en la urbo Cruz das Almas, de la 13a. ĝis la 14a. de oktobro pasintjare. La programo konsistis ĉefe el prelegoj, arta vespero, kurso kaj diskutado pri la temo "kiel pli efike progresigi esperanton en Bahia. La proksiman jaron, la II-a Renkontiĝo estis programita por Muritiba (raportis gesamideanoj Yvette M. Queiroz kaj José Saraiva Matos).

KAMPANJO POR PROPRA SIDEJO EN PERNAMBUCO - "Associação Pernambucana de Esperanto" iniciatis kampanjon cele al aceto de propra sidejo. Kontribuaĵojn oni povas sendi al: Rua Siqueira Campos, 279 (Edifício Brasília), 9º andar, sala 905 aŭ Caixa Postal 1139, 50.000-RECIFE, Pernambuco, aŭ ankoraŭ, Conta nº (3091) - 227.255-5 do Bradesco (Agência Guararapes, Recife).

ARTIKOLO PRI "ESPERANTO" EN "AVANTE" - En la septembra numero de "Avante", bulteno de la Grupo Peregrinos do Caminho de São Tiago aperis tutpaga artikolo pri la internacia lingvo.

RUBRIKO PRI ESPERANTO - Aperas regule en "Boletim Informativo do Grupo Espírita Francisco de Assis (Rua Djalma Dutra, 28, Niterói, RJ), sub la respondeco de S-ano Joaquim do Couto.

AGADO POR ESPERANTO EN GOIÁS - Laŭ "Informa Bulteno de Instituto Goiano de Esperanto" nº 1, okt/84, ankaŭ en tiu ŝtato oni diligente laboras por nia lingvo. En la unua semestro de la pasinta jaro, okazis bazaj kursoj en la sidejo de IGE (Av. Goiás, 636, s/104, 74.000-GOIÂNIA, Goiás) kaj la 11-an de aŭgusto estis liveritaj 12 diplomoj al kursfinintoj. Nuntempe, funkcias konversacia kurso. Kaj, la 28-an de aprilo pasintjare, estis elektita nova estraro de tiu Instituto por la periodo 1984/1985/1986, sub la prezidanteco de S-ano Eber Vaz.


ESPERANTO EN REGISTARA BULTENO - S-ano Claudio Spinelli sukcesis aperigi la ĉi-apudan noton pri esperanto ĉe "CONTRACHEQUE", Boletim Informativo da Secretaria de Estado de Fazendo do Rio de Janeiro, nº 06, sep/84.

NOVA ESTRARO ĈE "ESPERANTA KLUBO ZAMENHOF", EL SÃO MIGUEL PAU-LISTA, SP - La 2-an de decembro, estis elektita en tiu Klubo, nova estraro por la oficperiodo 1985/1986, sub la prezidanteco de S-ano Osvaldo Pires de Holanda. Gratulojn kaj fruktodonajn laborojn!

Correspondência em Esperanto

Kiom ni estas? Se vi komprenas tiujn vortojn, skribu al ni. Finfine, ni estas samideanoj. A tradução dessas palavras em esperanto para o português é: quantos nós somos? Se você compreende essas palavras, escreva-nos. Afinal somos co-idealistas.

O esperantista, Cláudio Spineli, deseja se corresponder com você que, se estiver interessado, basta enviar carta para a Rua da Alfândega, 42, 19 andar - Centro — Rio de Janeiro.



L.L.ZAMENHOF (1859 - 1917)

EN DECEMBRO, OMAĜO AL ZAMENHOF EN RIO DE JANEIRO

La 15-an de decembro, ĉirkaŭ 50 personoj ĉeestis, en la aŭditorio de SUESC (Praça da República, 50), al la kunveno omaĝe al Zamenhof, organizita de BEL.

Tiu kunveno konsistis el:

- Prelego de S-ano Paulo Sérgio Viana;

- Prezentado de aŭdvida programo en esperanto (Brazila Tu-

rismo kaj Bestegoj, Bestetoj kaj Bestaĉoj) kaj

- Lanco de novaj verkoj de Sylla Chaves: La Bufo (disko), Alma Prismatica (portugallingva libro kun poemoj pri paco, esperanto ktp ...) kaj "Canções Infantis" (disko).

La prelego de S-ano Paulo Sergio temis pri komparo inter la rilatoj de Zamenhof, la esperanto-movado kun la problemoj de lia tempo kaj tiuj de la nunaj esperantistoj kun la problemoj de la nuntempa mondo.

SEP KURSOJ DE ESPERANTO EN MACEIÓ - Laŭ informo aperinta en KLARIONO, nov/84, nuntempe funkcias sep kursoj de la internacia lingvo en la ĉefurbo de Alagoas: tri, en la kvartalo "Tabuleiro" kie S-ano Luiz Gonzaga instruas al dekjaraj infanoj; unu, ĉe "Federação Espírita", gvidata de S-a João Bruno de Oliveira; du, ĉe "Instituto de Linguas", gvidataj de S-ano Rossano Giuseppe F. de Arecipo, kaj unu, ĉe "Associação Alagoana de Esperanto", sub la gvido de ĝia Prezidanto, S-ano Ezequiel Alves. Korajn gratulojn al niaj "alagoanaj" samideanoj!

NOVA ESTRARO ĈE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO - La 18-an de novembro, estis elektita nova estraro de BKE por la oficperiodo 1985/1987: Nelson Pereira de Souza (Prezidanto), Elvira Fontes (Vic-Prezidanto), Ludimar Azevedo da Silva (Sekretario), José Carlos Dorini Ramos (Kasisto) kaj Paulo Vieira da Silva (Kulturaj Aferoj). Ni sincere deziras al la novaj estraranoj fruktodona oficperiodon!

ALMANAKO LORENZ 1985 - La 8-an de decembro, ce "União das Sociedades Espíritas do Estado do Rio de Janeiro"; estis lancita la eldonon rilate al 1985 de Almanako Lorenz. Tiu verko kiu estas eldonata ciujare de Spiritista Societo F.V.Lorenz, prezentas dekojn da interesaj artikoloj cefe pri spiritualismo. Vendebla ce la Libroservo de BEL (vidu aliloke).

DUDEK DU NOVAJ ESPERANTISTOJ EN RIO DE JANEIRO - Ankaŭ la saman daton, ĉe la sidejo de Niteroi Esperanto-Klubo, okazis la disdonado de diplomoj al la kursfinintoj de la kursoj gviditaj de S-anoj Balbina, Álvaro Fausto kaj Jair Salles. Reprezentis la Ligon S-ano Alfredo Aragón.

ESPERANTO EN "LITERATURA DE CORDEL" - Sub la titolo "Esperanto - a lingua internacional que ajuda os povos, num laço de cultura e de fraternismo", aperis verketo pri la internacia lingvo en la serio "Literatura de Cordel" nº 1.706 (Popularaj verketoj, verkitaj en simpla portugala lingvaĵo, laŭ poezia stilo). La aŭtoro estas S-ro Rodolfo Coelho Cavalcante.

ALTNIVELAJ KURSOJ EN BRASÍLIA - Inter la 4-a kaj la 9-a de februaro, Esperanto-Asocio de Brasilia okazigos, en sia sidejo, du altnivelajn kursojn gvidotajn de S-ano Geraldo Mattos, Membro de la Akademio de Esperanto. Ĉiu kurso daŭros 20 horoj kaj la temoj estos "Pedagogio" kaj "Gramatiko".

ESPERANTO ĈE "BANCO DO BRASIL" - La ĉi-suba informo kaj foto aperis en la revuo AABB, oficiala organo de "Associação Atlética Banco do Brasil" kaj sendata ĉiumonate al miloj da oficistoj de tiu grava Banko. Tiun laboron pri E-o ĉe "Banco do Brasil" oni ŝuldas al la S-anoj Jorge das Neves kaj Ruy Cavalcanti e Albuquerque.

Informes Culturais

ESPERANTO NO MUNDO E NA AABB



Segue com muito boa aceitação o Curso de Esperanto iniciado dia 6 de novembro em nossa AABB. Antecedendo o Curso foi realizada uma palestra com debates e projeção de slides sobre a língua internacional, a

cargo do poeta Jorge das Neves e Ruy Cavalcanti e Albuquerque, que foi, inclusive, prestigiada pelo Presidente da Liga Brasileira de Esperanto, Coronel Marinho.





ANO 51 - Nº 609/Dezembro